

esperanto aktuala

Revuo de la Esperantista Brusela Grupo

Numero 6 / 2014





« CONCEPT »

Malkonstrui la vortojn per ideojn



En la lasta
KoKoLoRES
(esperanta ludrenkontiĝo en
Germanio), kelkaj homoj restis tutan
vesperon ĉirkaŭ tablo, amuziĝante kun iu
divenludo kiu nomiĝas «Concept».

La ludo povas iom
komplikiĝi per aliaj
vortoj, esprimoj, aŭ
nomoj de konataj homoj.
La verda demandosigno



La tabulo konsistas el 115 bildetojn kiuj
reprezentas ideojn.



*priskribas la specon de la vorto : en tiu kazo estas
profesio aŭ okupo. La verda kvadrato rilatas al tio : ni
serĉas viron.*

La aliaj koloroj estas sub-ideoj.

Ni do serĉas :

(verde) • Okupo aŭ profesio de viro

*(ruĝe) • Kiu rilatas al granda bruna rapida **besto***

*(blue) • Kiu rilatas al **lando** kies flago estas blua, ruĝa,
blanka, kun stelo(j)n.*

Tiu ludo estas nekredible bone farita, ĉar
eblas divenigi ĉiujn eblajn aferojn pere de
malmultaj bildoj. Kaj ĉiu ludanto laŭ sia
propra maniero.

Interese, ekzistas evidenta rilato al
Esperanto : ambaŭ malkonstruas la vortojn
per ideoj. Esperanto havas siajn sufiksojn
(mal-, -il, ktp), Concept funkcias same.
Provu divenigi «manĝilaron» ekzemple : vi
verŝajne uzos la piktogramojn / ideojn
«ilo», «plurajn» kaj «manĝo»...


En ĉi-tiu ekzemplo, la unua bildo estas
likvaĵo/akvo/guto. La dua rilatas al
manĝaĵo. La tria reprezentas la blankan
koloron.

La celo estas divenigi vorton al la aliaj, kaj
tiel krei rilatojn inter la piktogramoj.

Denove rigardu la supran ekzemplon : ni
serĉas likvaĵon, kiu rilatas al manĝaĵo kaj
kiu estas blanka. Ĉu vi trovis ? Temas pri
lakto kompreneble.

K O L O F O N O

39a ELDONJARO. **Redaktoroj** : Laurent kaj Samy Loisse : aktuala@esperantobruselo.org ;
 Fondita en 1976, de Léo De Bruyne, informilo kaj oficiala organo de Esperantista Brusela Grupo, societo centjara neprofitcela fondita je la 10a de Februaro 1907, registrita en la belga ŝtata oficiala ĵurnalo «Belgisch Staatsblad, Moniteur Belge» kun la n° 0419498274, honorigita kiel reĝa societo ek de la 29a de Majo 1957. **Aktuala estas libere elŝutebla tie** : <https://sites.google.com/site/ebgaktuala/>
Prezidanto : JM Nicolas de BUYL : prezidanto@esperantobruselo.org ; **Kasisto** : Jan Amadori jan.amadori@gmail.com
Sekretario : Laurent Loisse sekretario@esperantobruselo.org , **Informoj / kursoj** : Françoise Pellegrin fransuaz@esperantobruselo.org
Eventoj : JM Nicolas de Buyl nikolao@esperantobruselo.org **Retejo de EBG** : www.esperantobruselo.org
Abona membriĝo : 10 aŭ 13 eŭroj jare, konto : **IBAN** : BE87 5230 8055 0794, **BIC** : TRIOBEBB de la Esperantista Brusela Grupo
Kunvenejo : rue Van Maerlant 2, 1000 Bruselo Metroo Maelbeek ĉiumerkrede 18h30-20h00 - Tie nek poŝtkesto, nek telefono .
 Vidpunktoj de artikoloj en Aktuala ne nepre spegulas opiniojn de la ĉefa redaktoro aŭ de EBG - Esperantista Brusela Grupo



A G Ĝ E N D O

Bonvolu kontroli la ĝisdatigojn sur nia nova retejo : www.esperantobruselo.org

Kursoj kaj kunveno okazas ĉiumerkrede en nia kunvenejo en la konstruaĵo de la Eŭropa Komisiono,
 Rue Van Maerlantstraat 2, 1000 Bruselo.

Novuloj, bonvolu sin anonci al fransuaz@esperantobruselo.org aŭ telefone +32 2 358 27 28

EBG faras alvokon al prelegontoj por plenigi sian kalendaron,
 bonvolu kontakti nikolao@esperantobruselo.org aŭ vespere 0478 382 981

NOVEMBRO

Merkredo la 12a 18:30 - 20:00 **Prelego:** Bernard-Régis Larue : «Kosmoŝipo Rosetta»

**Sabato la 15a ĝis
 dimanĉo la 16a** 13:00
 17:00 **26a Eŭropa rendevuo en Stella-Plage**

Merkredo la 26a 18:30 - 20:00 **Prelego:** Eric Baert : «Laboro en Irako»

DECEMBRO

Sabato la 6a 14:00 - 16:00 **Konversacio rondo** en Dilbeek
 Pli da informoj ĉe Lydia Buyst (054 33 01 51)

Merkredo la 10a 18:30 - 20:00 **Prelego:** Joseph van der Vleugel pri
 « Genetiko de la origina peko »

Merkredo la 17a 18:30 - 20:00 **Zam' Festeto ĉe EBG-ejo** Bonvolu kunporti vian
 bonhumoron, drinkaĵojn kaj manĝetaĵojn

**De la 27a ĝis la
 3a de Januaro 2015** **Novjara Renkontiĝo (NR)** www.esperantoland.org

**De la 28a ĝis la
 4a de Januaro 2015** **Junulara E-Semajno (JES)** www.jes.pej.pl

LILLE 2015
 esperanto
 Ni subtenas!

Saluton Kara Legantaro !

Kiel sendanĝerigi niajn monstrojn, tiumomente de «*Halloween*», sen bombonoj nek kanzonoj ? lo okazos baldaŭ. Jes, ĉiam ĉio okazas. Sed ŝajnas klare al ĉiuj ke la (relativa) ekvilibro de niaj diversaj sistemoj (financaj, politikaj, socialaj, ekologiaj,...) estu post nelonge ofertitaj al nuntempaj «Dioj» (aŭ Maldioj): Malsolidareco, Malscio, Avideco, ... Tamen, tio ne kreskigos la interesojn de la plimulto, ĉu ne?

Tiam estas ankoraŭ taŭgaj tialoj por esperi spekti disvolvon de pligranda konscio en nia homaro kaj impulsi novajn socio-direktadojn, eĉ se gravegaj malbonaj novaĵoj abundas el ĉie.

Ĉirkaŭ ni, ni agu! Ne nur politike, per manifestacioj, ktp... Ankaŭ ni montru al familianoj kaj rilatuloj ke ni rifuzas disigi nin pro religiaj kredoj, etnikaj devenoj, samseksemuleco aŭ genro-aferoj.



Ke ni ŝategas la riĉecojn de nia planedo: la naturon kompreneble, sed ankaŭ artojn, kulturojn, diversajn filozofiojn, ... kaj lingvojn de la homaro.

Ke ni, ĉiuj, diversmaniere unuiĝu kaj rezistu al niaj monstroj. Ke vivo belas kaj ĉefe ke... ni havas estontecon !

Viaj redaktoroj

aktuala@esperantobruselo.org

Post Bonaero
jen **Lillo** fariĝas la nova unujara
ĉefurbo de Esperantujo!

Lille, capitale mondiale de l'espéranto en 2015!



Enhavo

- Paĝo 2 : Ludo «*Concept*»
- Paĝo 3 : Kolofono kaj Agendo
- Paĝo 4 : Edito kaj Enhavo
- Paĝo 5 : Kunkantado en *Ariège*
- Paĝo 6 - 7 : Vikipedio atingis 200.000 artikolojn
- Paĝo 8 : Joy Denalane: Esperanto
- Paĝo 9 : Olivia Grassner: Esperanto
- Paĝo 10 - 12 : Ciril kaj Roz, Vojaĝo per biciklo
- Paĝo 13 - 16 : La «Diplo»: Milito kontraŭ terorismo, 3a Akto
- Paĝo 17 : Diaspora*Framasphère - Voĉoj de la Tempo
- Paĝo 18 - 19 : Bildstrioj pri denaskuloj
- Paĝo 20 : Eskapado en Bruselo - 1a Verda promenado : La Reĝaj Parkoj



Korusemuloj... Kantemuloj... Muzikemuloj...

Foje venu en **La Bastide sur l'Hers** (Ariège, Francio)

por sperti kunkantadon plurvoĉan...

De la **14a** ĝis la **21a** de **Februaro 2015**

...sub gvido de la Bulgarino, kiu jam gvidis 4 el niaj staĝoj,

Zravka BOJĈEVA

korusestros divers-nacian (ankaŭ divers-nivelan) aron da
(ne-)Eo-scipovantaj ge-korusanoj en divers-epoka kaj divers-stila
Eo-repertuaro (originala kaj tradukita)



Ni ĉiutage kantos 5 horojn kaj povos plie turismi, debati, ludi, lerni E-on... laŭplaĉe, ev. skii kaj krome pluraj partoprenontoj ankaŭ **folkmuzikemaj** alportos siajn instrumentojn por eventuale ludi kun lokuloj : Gérard, Patrick, Alyson & aliaj.

Trian fojon ankaŭ, ŝatita anglino **Jud GRETTON** ĉeestos por **Tajĉi**-ece prepari la kor(p)ojn.

Petu pliajn informojn de JORGOS : tel-n° 33 / 0 468 605 417

aŭ retadrese tutpeko@aliceadsl.fr

www.esperanto-midipyrenees.org/agenda



La Esperanta Vikipedio atingis 200.000 artikolojn

La esperantlingva versio de la reta enciklopedio havas nun pli da artikoloj ol ekzemple la slovaka, kroata, estona aŭ litova vikipedioj. La plej multajn artikolojn havas la angla Vikipedio: kvar milionojn. Pri la nova rekordo informis vikipediisto Thomas Guibal, kiu poste konsentis respondi al kelkaj demandoj de Libera Folio.



En merkredo, 13-a de aŭgusto 2014, la Esperanta Vikipedio atingis la nombron de 200.000 artikoloj. Per tio la enciklopedio en la internacia lingvo havas lokon 33 inter la diverslingvaj versioj de Vikipedio.

La 200.000-a artikolo temas pri «(12731)1991RW12, malbone konata asteroido de la asteroida zono, malkovrita la 10-an de septembro 1991 de la usona astronomo Henry E. Holt el la Observatorio de Monto Palomar en Kalifornio.

En la redaktado de la Esperanta Vikipedio partoprenis proksimume 356 aktivaj uzantoj dum la lastaj 30 tagoj. De ĝia fondo entute 96.549 uzantoj plenumis 5.593.130 redaktojn.

La enciklopedio estis fondita en decembro 2001, kiam Chuck Smith kunlaboris kun Jerry Muelver kaj Stefano Kalb pri baza Vikipedio de 139 artikoloj. La Esperanto-Paĝo 6

Vikipedio estis publikigita la 2-an de januaro 2002, jam kun pli ol 300 paĝoj.

Aldone al la Vikipedio ekzistas en Esperanto maŝine tradukita versio de la anglalingva vikipedio, Wikitrans, kiu havas pli ol tri milionojn da artikoloj. Kvankam maŝine tradukita ĝi estas relative bone komprenebla kaj servas al multaj Esperanto-parolantoj.

Maŝinaj tradukoj helpas ankaŭ en la plua ellaboro de la Vikipedio. Ekzistas du specialaj paĝoj, kiuj subtenas la kreadon de novaj artikoloj, GramTrans kaj Vikitradingilo, rakontas vikipediisto Thomas Guibal en komuniko sendita al Libera Folio. Ni petis lin respondi al kelkaj kompletigaj demandoj.

Libera Folio: Kial laŭ vi gravas, ke la kvanto de artikoloj en la Esperanta vikipedio atingu daŭre novajn rekordojn?

Thomas Guibal: – Daŭra kreado de novaj artikoloj ne estas absoluta celo de la enciklopedio, sed bona kaj utila indikilo pri ties sano. Nu, prave, kelkaj uzantoj ja preferas redakti grandan nombron da artikoloj (la 200.000-a, pri asteroido, estas perfekta ekzemplo), kun la espero atingi novan "mejoŝtonon" kiel eble plej rapide, dum aliaj preferas verki aŭ traduki pli longajn tekstojn, kiuj espereble akiras rangon de "legindaj" aŭ eĉ "elstaraj artikoloj". Ĉiukaze, ambaŭ strategioj kaj kontribuantoj estas same altvaloraj por la projekto, ĉar ili helpas al la plibonigo de diversa kaj eksterordinara kunlaboraĵo.





– Cetere, novaj rekordoj utilas por la ekstera renomo de Vikipedio en Esperantio kaj do por la rekrutado de novaj volontuloj.

Kiom el la lastatempaj novaj artikoloj estas aŭtomate kreitaj?

– Laŭ mia scio ne plu estas aŭtomata kreado de novaj artikoloj en Vikipedio jam de multaj jaroj : tiam, precipe antaŭ 2008 kaj la 100.000-a artikolo, oni uzis robotojn por amase krei artikolojn en kelkaj kategorioj, ekzemple italaj komunumoj. Tion oni rezignis pro la malbonkvaliteco de la generitaj tekstoj. Nun ĉiu unuopa artikolo bezonas homan intervenon (do inkluzive de la 200.000-a, al kiu ĝia kreinto ŝajne dediĉis dek minutojn, konsiderante la horon de lia antaŭa kreaĵo). Oni atentu, ke aŭtomataj tradukiloj kiel Vikitradukilo povas ja asisti kelkajn uzantojn, precipe novparolantojn, sed ne generas sufiĉe bonkvalitajn tekstojn por senpera kaj aŭtomata publikigo.

Kion povas fari novulo, kiu volus kontribui al plibonigo de la esperanta Vikipedio?

– Vikipedio bezonas kaj kore bonvenigas novulojn! Por bona komenco sufiĉas krei novan konton kaj sekve iri al la komunuma portalo (<https://eo.wikipedia.org/wiki/>

Portalo:Komunumo), kie vi lernos pri la plej bazaj reguloj. Aŭ rekte al la helpopaĝo «Kiel kontribui» (https://eo.wikipedia.org/wiki/Helpo:Kiel_kontribui).

Tute ne necesas ampleksa scipovo pri komputiko. Ĉiu ajn esperantisto kapablos redakti la paĝon pri sia lando/ urbo/ preferata fako/ ktp. apenaŭ post kelkaj minutoj. Teknikaj aŭ enhavaj problemoj estas libere kaj amike diskutataj en nia "Diskutejo".



Kion eblus fari por altigi la ĝeneralan kvaliton de la artikoloj? Kaj kiom da esperantistoj regule kontribuas al Vikipedio?

– La rimedo por pli bona kvalito neniel estas enigmo: la plej sukcesaj Vikipedioj, kiel la angla aŭ la

franca, havas multe pli grandan bazon da aktivaj uzantoj. Kompreneble estas malpli da esperantistoj ol anglalingvanoj aŭ franclingvanoj en la mondo.

Se vi tamen konsideras ke al Vikipedio averaĝe kontribuas apenaŭ 200 aŭ 300 uzantoj ĉiumonate – inter kiuj eble nur kelkaj dekoj plenumas signifan nombron de redaktoj – tiam evidentiĝas, ke nia enciklopedio kun la helpo de aliaj esperantistoj povus plibeliĝi en la plej mirinda maniero!

Spektinde el «MTV-Unplugged» : *Esperanto*

«**Esperanto**»

Joy Denalane

(<http://vimeo.com/82376434>)

**Joy Maureen
DENALANE**

naskiĝis la 11an de Junio 1973 en Berlino. Ŝi estas fama *soul-folk*, *jazz* kantistino.

Ŝi komencis kanti kiam ŝi estis deksesjaraĝa. Tiuepoke ŝi foriris de la gepatra domo por almetiĝi *reggae* kaj *soul* grupojn : *Culture Roots* kaj *Family Affair*, en sia berlina kvartalo, Kreuzberg.

Poste ŝi loĝis en Stuttgart, kie ŝi renkontis muzikverkiston kaj muzikprodukiston : **D.J. Thomilla** kaj ankaŭ la elektronikan muzikgrupon **Tiefschwarz**.

Tiam ŝi eklaboris kun **FREUNDESKREIS** («Amikaro» en la germana) kiu estas rep-grupo, fama pro iliaj politikaj tekstoj, denunciante socialajn malegalecojn, subtenante interŝanĝojn inter popoloj de la mondo.

La grupestro de Freundeskreis, Max Herre, edziĝis kun Joy Denalane en 1999. La paro havos du filojn: Isaiah en 2001 kaj Jamil en 2003.

Max kaj Joy kunlaboris kun Youssou N'Dour por kunkanti sur «So many men».



Joey Delanane registris ĝis nun kvin KD-ojn, kies du koncertajn albumojn.

En tiu-ĉi filmeto de la Televido MTV-Akustika, Joy Denalane kantas akompanata per sia edzo kun grupo.

Kutime ŝi kantas en la anglan kaj la germanan, sed por ĉi-kanzono, ŝi kantas la sukcesan furorkanton de **FREUNDESKREIS** : «**Esperanto**» ankaŭ parte en la francan. Ekzemple, la rekantiĝoj :

*«Esperanto, c'est la langue de l'amour, (que) tour à tour vient à parler
Esperanto, et à ce jour, l'espoir est né
Esperanto»*

Kaj ankaŭ:

*«Pour tous les gens de tous pays
Pour tous les gens qui sont ici
Esperanto neuf
Les temps vont changer avec ce son neuf
Et si tu aimes ce son-là
Amikaro et Déborah
C'est qu'un début
Tu peux compter là-dessus
Nous, on croit en Esperanto»*

Spektinde el Germanio : *Esperanto*

«Esperanto»

Olivia Irmengard Grassner

(<http://vimeo.com/83774499>)


Olivia Irmengard GRASSNER

naskiĝis la 19an de Septembro 1992 (do nun 22-jara). Ŝi estas germana *soul* kaj rokmuzika kantistino, vivanta en Hanovro.

En 2012-2013 kaj 2013-2014 ŝi estis gvida kantistino de artista spektaklo, turnee prezentata en decembro kaj januaro en pluraj eventoj de Germanio kaj nomata *Feuerwerk der Turnkunst* («piroteknikaĵo de gimnastika arto»).

La turneo de januaro 2014 havis la temon "Esperanto - mitreißend, exotisch, spektakulär" ("Esperanto - entuziasmiga, ekzotika, spektakla"). En ĝi la komparo al la lingvo Esperanto uziĝis por substreki la internaciecon de la artista prezentaĵo, sed la internacia lingvo ankaŭ mem en la voĉaj komentoj (kaj skribaj dokumentoj) de la evento prezentiĝis plej pozitive. Unua el pluraj kulminoj de la evento estis modernece rokmuzike balada interpreto de


la poemo «*La Espero*» de L.L. Zamenhof kantata fare de la muzikistino infana ĥoruso el la urbo Hanovro - en plejparte senakcenta Esperanto, kiun la spektantoj en la programa kajero ankaŭ



povis sekvi en esperantlingva skriba versio kun proza germanlingva traduko.

Sed ankaŭ en la plia fluo de la evento multaj flataj aludoj al la simpatia internacieco de Esperanto, kaj fine la artistoj disĵetis plurajn ŝvebantajn terglobiformajn balonojn en la spektantaron, simbole por la dezirinda pludisvastiĝo de la pacaj ideoj de la internacia lingvo.

Laŭ informo de la germana radia kaj televida korporacio ARD taksatas, ke ĝis fino de januaro 2014 pli ol 200 000 spektantoj vidis la scenejan prezentaĵon "Esperanto".



Muzika kompaktdisko kaj tekstaj kajeroj de la kanto "La Espero" kaj aliaj kantoj de Olivia Grassner el la turneo "Esperanto" de 2014

Vojaĝo per bicliklo tra la mondo de Cirilo kaj Roz'



Turkio

20/5 -> 5/7/2009 - 2231 km (6842 km)



▷ La ponton, kiu apartigas Grekion kaj Turkion, ambaŭflanke prigardas armitaj militistoj. Ne plu estas la kirkoj kaj la etaj kapeloj grekaj, aperas moskeoj kun minaretoj vokantaj al preĝo kvin fojojn tage. Ili ĉie aŭdeblas, eĉ meze de montaroj. Ilia melodio agrablas, escepte je la kvina kaj dudek-dua horoj.

La tutlanda vojo n-ro 100 trakuras la landon de Grekio ĝis Irano kaj similas al aŭtoŝoseo: kvar trakoj kaj du grandaj savtrako samlarĝaj kiel la trafiktrako. Ili egale utilas ankaŭ al ĉaretoj, traktoroj kaj eĉ al ĉiuj veturiloj, kiuj inversdirekte veturas pro centra divid-fosaĵo aŭ barilo.

50 km post nia eniro en la landon ni daŭre ne havas turkajn lirojn. Dum ni paŭzas en benzinejo, spontanee "sponsoras" nin je 20 liroj (ĉirkaŭ 10 eŭroj) turko loĝanta en Francio kaj iranta al Istanbulo por ferii. Jen trafa faro, ni povos aĉeti nutraĵojn en la sekvaj vilaĝoj ĝis Tekirdağ, kie ni finfine trovos bankon.

En Istanbulo akceptas nin la juna aktorino Evrim dank' al internacia gastigreto biciklista. Ŝi jam gastigas francan perbiciklan vojaĝanton, Matt, kaj lian katalunan kunbiciklanton Oriol. Ili alvenas de Barato tra Irano kaj celas al Bulgario.

Istanbulo havas unu piedon en Eŭropo kaj la alian en Azio. La urbon dividas Bosforon, markolon, kiu ligas la Egean kaj la Nigran marojn. La "turistejoj" troviĝas eŭropflanke.





Ni tie vizitas Sanktan Sofion, komence katedralon, poste moskeon, nuntempe muzeon. Sekve la Bluan Moskeon kaj precipe la palacon Topkapi kaj ties belegan haremon, malgraŭ la multekosta enirbileto, pli ol po 40 eŭroj home. Ni tamen preferas la aziflankajn kvartalojn de la urbo, kie ni ĉiuvespere dormas post pramŝipa transbosforiĝo, kion faras multaj istanbulanoj. Survoje al la hejmo de Evrim ni trapasas bazaron, kie intermiksiĝas spicoj, sekaj fruktoj kaj freŝaj legomoj, sed ankaŭ la bongustegaj "simit-oj", etaj pankronoj surŝutitaj de linaj grajnoj. Ni tie aĉetas sodakvon en boteloj je 2,5 litroj kontraŭ bagatela prezo kaj ĉiajn sezonajn fruktojn. Ni frandas mitulojn farĉitajn per rizo podetale vendataj sur la havenaj kajoj. Oni surloke manĝas ilin starante ĉe la vendisto kaj oni pagas laŭ la prenita kvanto.



Por eliri el Istanbul, Evrim, Matt, Oriol kaj Ebrou, alia istanbulano, akompanas nin dum ĉirkaŭ 40 km. Ni ĉi-tage biciklos 70 pliajn kilometrojn, ĝis Izmit. Ni tie preparas krespojn por Tav, nia gastiganto. Li devenas de Alasko kaj instruas la anglan en tiu urbo. Nia sekva gastiganto, Can, en Ankaro, verŝajne estas la sola turko kiu ne ŝatas teon, la narcian trinkaĵon franditan ĉie kaj ĉiam. Cirilo tiele sin sentas malpli sola.



Kun sia koramikino Can vizitigas al ni la maŭzoleon de Atatürk (Mustapha Kemal), patro de la turka nacio kaj pli fama ol De Gaulle en Francio. Ni sekve iras al la turo Atagül, kiu simbolas la ĉefurbon kaj je kies supro troviĝas panorama restoracio turniranranta sur si mem en unu horo.

En Turkio troveblas specifaj parkoj en kiujn eblas kunporti sian kradrostilon. Can tien portas nin por pikniki per "kofte kaj tavuk", viandbuletoj kaj kokidaĵo. Je la fino ni frandas tipan deserton, kies recepton Roz' konservas por rekrei post nia reveno en Francion

Ni pluiras al Kapadokio, mita loko, kie domojn kaj preĝejojn oni fosis en rokoj. Surloke, en Zelve, iu vokas al Roz'. Temas pri ŝia parizana amikino kun kiu ŝi kutimas piedmigi. Tute hazarde ni alvenas, kiam ŝi ĵus finvizitis la lokon. Ni disponas nur sufiĉan tempon por fari komunan foton

antaŭ ol ŝia buso foriros. Ni sekve vizitas Göreme-n, alian mitan lokon. Kiam ni resurvojiĝas jam preskaŭ noktas kaj ni rigardas, ĉu eblus dormi en kaverna domo. Ni jam dormis supre de interkrutejo en Francio, en bunkro en Albanio, kial ne plia malbanala loko?



Ni trovas malplenajn kavojn apud tendumejo sed iu alvenas kaj staras ĉe Roz' dum Cirilo serĉas taŭgan kaj alireblan kavon por dormi. Li estas gardisto en la aliflanka citronkonservejo kaj li proponas senpage gastigi nin en sia hejmo, kio kvazaŭ ne povas okazi en tiu ege turisma regiono. Ni konsentas kvankam ni bedaŭras, ke ni ne povos dormi en roko. Surprize, li loĝas en granda kaverna domo, kiun li mem konstruis antaŭ dudek jaroj. Li disponas salonon, kuirejon, duŝejon, necesejon kaj unu dormĉambron. En la salono staras trinkeja bufedo fosita en la roko, same pri la tablo kaj la biblioteko. Se li iam deziras novan ĉambron li nur bezonos fosi. Li preparas por ni ĉarbon kaj bulghuron, kiujn akompanas vino el lia bieno. Ni finas la manĝon per granatsirolo sur pano. Li kutimas gastigi turistojn el la tuta mondo kaj, same kiel al la aliaj, li petas, ke ni bonvolu skribi kelkajn vortojn en lia gastlibro, la sepa ekde 1991! Ja en Turkio ni spertas nian unuan krevon, je la antaŭa rado de Roz'. Cirilo montras siajn talentojn pri flikado kaj ni reekiras...

dum nur du kilometroj.



Nova kredo, je la tute sama loko. Nova malmuntado por finfine trovi la kulpulon, vitraĵpeceton, kiu eskapis la kontrolon de la "fakulo". Cirilo ne pli bonŝanĉas pri sia antaŭa rado. Ŝiriĝas lia radcirklo kaj li devas viziti plurajn riparistojn antaŭ ol trovi novan cirklon pli malpli taŭgan.

Post unu monato kun senĉesaj suprenmalsuprendeklivoj, ni pasis de la marnivelo al pli ol 2200 m alte. Post pli ol 2200 km bicikle, ni proksimiĝas al la irana landlimo preterpasante la plej altan monton de Turkio, la monton Ararat, kies supron permanente kovras neĝo kaj ofte kaŝas nuboj.

En Turkio plej impresis nin la natura scivolemo de la homoj. Ĉie tra la lando oni demandadis pri niaj nomoj, nia deveno, nia celo, nia geedzeca stato, nia laboro... Senĉesa ĉiutaga polica enketado. Fine preterpasas nin kirasita tanko de kies laŭtparolilo eliĝas voĉo deziranta "Welcome to Turkey" ("Bonvenon en Turkio"). Prefereble malfrue ol neniam!

(daŭrigota)



« Milito kontraŭ terorismo », 3-a Akto

Le Monde
diplomatique



★ en Esperanto - eo.mondediplo.com

La okcidentaj bombadoj en Irako kaj en Sirio anoncas longdaŭran kampanjon kontraŭ la Organizaĵo de la islama ŝtato. La retoriko de la Obama-administracio memorigas ĉiutage iom pli tiun de la prezidanto George W. Bush, kies politiko kondukis al la nuna katastrofa situacio. Ĝi estas des pli danĝera, ke Usono kunigas tre nehomogenan koalicion ĉirkaŭ politikaj celoj neklaraj.

ONI NE TROMPIĜU. Tio kio okazas en Proksim-Oriento estas ja relanĉo de la « milito kontraŭ terorismo », rekte devenanta de la « krucmilito » ekigita de la prezidanto George W Bush post la atencoj de la 11-a de septembro 2001. Enoficiĝinte en la Blanka Domo, s-ro Barack Obama faris neprajn reviziojn, post la doloraj malsukcesoj suferitaj en Irako kaj en Afganujo. Lia administracio forigis la esprimon « milito kontraŭ terorismo » kaj, precipe, promesis eligi Usonon el tiuj du ŝlimejoj. Tiuj evoluoj ankaŭ spegulis lacecon de la usona publika opinio antaŭ intervenoj tiom kostaj en homaj vivoj, kiom en mono. Fine, Vaŝintono « turniĝis » al Azio, dezirante iom forgesi la « *Middle East, middle of nowhere* », tiu « Proksim-Oriento meze de nenie » [1], kiun priskribis usona fakulo : la regiono, escepte pri petrolo, ne plu havas gravan strategian intereson.

Sed la krizoj ĉiutage memorigis sin al la ministrejo pri eksteraj aferoj (*Department of State*), kaj Vaŝingtono ne retiriĝis. Atestas pri tio la pli intensa uzo de la senpilotaj flugmaŝinoj kaj politikaj murdoj en

Pakistano, Jemeno kaj Somalio, la pluvivo de la Guantanamo-tendaro, la plurestado de armeaj fortoj en Afganujo, la reasertita subteno al Israelo okaze de ties interveno en Gazao en somero 2014...

La parolado de s-ro Obama la 10-an de septembro 2014, anoncante operaciojn kontraŭ la Organizaĵo de la islama ŝtato (OIŜ) en Irako kaj en Sirio markas la komencon, ne de la detruo de tiu forto, sed de iom-post-ioma reciproka intensigo de la perforto, pri kiu neniu povas antaŭdiri la finon. La usona prezidanto privilegias la militan vidadon, malfavore al la politika agado. Jes ja, s-ro Obama ne referencas al la ideologia simplismo de la novkonservativuloj, kaj rifuzas, ĝis nun, sendi surfacajn trupojn – eĉ se oni nombras jam mil kvincent usonajn konsilistojn surloke. Li ankaŭ taksas la obstaklojn pli bone ol s-ro Bush, kio klarigas lian volon prezenti sian agadon konstruita sur internacia interkonsento. Malŝarĝante sin je siaj respondecoj, la Konsilantaro pri Sekureco de la Unuiĝintaj Nacioj (UN) adoptis, la 19-an de septembro 2014, deklaron sufiĉe malprecizan, por ke Vaŝintono povu konsideri ĝin kiel permeson al sia milita interveno kaj neniu registaro protestu.

Unuavide, la koalicio de ŝtatoj starigita kontraŭ la OIŜ ŝajnas pli timinda ol tiu antaŭe starigita kontraŭ la reĝimo de Muamar Kadafi. Okaze de sia pintkunveno en Newport (Kimrujo), la 4-an kaj 5-an de septembro 2014, la Nord-Atlantika Traktato-Organizo (NATO) anoncis, ke ĝi

formas la « kernon » de la koalicio kontraŭ la OIŜ kun dek landoj, inter kiuj Francujo, Usono kaj Turkujo. En Parizo, la 15-an de septembro, dudek ses ŝtatoj promesis sian principan partoprenon en tiu strebado, inter kiuj la membroj de la Kunlabor-Konsilio de la Golfo (KKG), Rusujo kaj Ĉinujo. Alĝerio, kutime tre sindetenema koncerne la okcidentajn intervenojn en la regiono, subtenas la koalicion en Irako. Eĉ Irano, kiu ne aliĝis al la koalicio, konsideras la OIŜ kaj ties flamiĝantajn admonojn kontraŭ la ŝijaistoj kiel mortigan danĝeron.

En la religia sfero, Al-Azhar en Kairo kaj la Konsilio de la grandaj saudaj Ulemaoj en Riado predikis samdirekten, mallaŭdante ne nur la OIŜ, sed ankaŭ la Hizbulahon, la jemenajn ribelantojn de la Houthi-fratoj (houtiistojn) kaj la irakajn ŝijaistajn milicojn. Eĉ en 1990-1991, okaze de la milito, kiu sekvis la invadon de Kuvajto fare de Saddam Hussein, tiom unuanima alianco ne povis formiĝi.

Hezitado de Turkujo

TAMEN, Kiel memorigis Lenin analizante la imperiismajn aliancojn dum la unua mondmilito, « *ĉeno valoras tiom kiam valoras ĝia plej malforta ĉenero* ». Sed la ĉeno, kiu devas ĉirkaŭfermi kaj sufoki la OIŜ, ne havas nur unu sed plurajn malfortajn elementojn.

Kvankam ĝi membras en NATO kaj havas komunan ducent kilometrojn longan landlimon kun Irako kaj Sirio, Turkujo aperas kiel la plej malforta ĉenero. Ankaro unue pravigis sian singardemon – aparte sian rifuzon lasi Usonon uzi la militbazon Incirlik por militaj agoj en la regiono, kvankam ĝi permesas homhelpajn kaj loĝistikajn agadojn – per sia zorgo protekti la kvardek naŭ ostaĝojn kaptitajn de la OIŜ en la turka konsulejo de Mosulo, kiam ĝi ekokupis tiun urbon la 9-an de junio 2014.

Ilia liberiĝo la 19-an de septembro ne tute forigis ĝian hezidadon.

Klarigas ĝin unue ĝia koncernateco en la siria konflikto kaj la prioritato donita al la faligo de la reĝimo de s-ro Baŝar Al-Asad. Turkujo permesis instaladon sur sia teritorio de varbad-retoj por la opozicio, inkluzive de la plej radikala, ligita al Al-Kaido, eĉ al la OIŜ. Inter la eksterlandaj batalantoj de tiu ĉi, la turkaj civitanoj estas unu el la ĉefaj konsistaĵoj. Azila tero por preskaŭ miliono kaj duono da siriaj rifuĝantoj, ĝi timas, ke rekta engaĝiĝo kontraŭ la OIŜ estigos ondon da atencoj sur ĝia teritorio.

Sed la plej serioza hezito de Ankaro rilate la koalicion koncernas la kurdojn. Komencinte internan politikan dialogon kun la Partio de la Laboristoj de Kurdujo (Kurdistano) (PLK), Ankaro rigardas ĝian armean plifortigon kiel tre maloportunan. Ĉar, kvankam la kurdoj ja, en iuj okazoj haltigis la antaŭeniron de la OIŜ, ne estas la irakaj « *peshmergoj* », - tiuj batalantoj pretaj alfronti morton, kiel indikas ties nomo - kiuj esence batalis. De la kvazaŭ aŭtonomeco de la kurda-iraka regiono (kiu ekzistas de la Golfo-milito, en 1990-91), iliaj gvidantoj ĉefe interesiĝas pri negoco kaj pri siaj dividoj. Plivastigo de ilia teritorio (ekokupo de Kirkuko) kaj sendependeco estas ilia ĉefa celo, ne la lukto kontraŭ la OIŜ. Estas la PLK kaj precipe ties siria branĉo, la Partio de la demokrata Unio (PDU), kiuj provizis la plej grandan parton de la batalantoj. Kvankam tiuj movadoj estas eĉ metitaj de Vaŝingtono kaj Bruselo sur la liston de la terorismaj organizaĵoj, ili tre verŝajne povos ricevi kaj uzi armilojn provizitajn de Okcidento al la kurdoj. Jen plia pruvo, ke la koncepto « terorismo » varias laŭ cirkonstancoj, kaj celas antaŭ ĉio miskreditigi tian aŭ tian ĉi organizaĵon, por pravigi militajn intervenojn.

Dua necerta ĉenero : Sauda Arabujo. Ĝi ĉi lastajn monatojn faris radikalajn iniciatojn por kontraŭstari la OIŜ, adoptante severajn kontraŭ-terorismajn leĝojn, kiujn ĝi uzas ankaŭ kontraŭ ĉiuj aliaj oponentoj. La lando ne forgesas la mortigan atenco-kampanjon de Al-Kaido sur sia teritorio inter 2003 kaj 2006. Riado ankaŭ strebas moderigi la predikojn de siaj imamoj. La ministrejo pri religiaj aferoj enskribis centon da ili, taksataj « *ekstremistoj* » en intensaj reedukaj kursoj, minacante eksigi ilin se ili ne ŝanĝiĝas. Restas la demando, pri kiaj estos la konsekvencoj de tiu nova orientiĝo al religiuloj nutrataj de jardekoj per tiu ekstremisma interpretado de islamo, kiun ili larĝe kontribuis eksporti tra la mondo.

Same kiel multaj gvidantoj de la regiono, la reĝo Abdullah ibn Abdulaziz al-Saud ne fidis s-ron Obama. Li pardonas al li nek lian forlason de la egipta prezidanto Hosni Mubarak en 2011, nek lian rifuzon bombardi Sirion en septembro 2013. Li dubas pri lia kapablo trudi veran ŝanĝon al Bagdado, kiun la reĝo konsideras forte dependa de Tehrano. Arabujo sentas sin solidara de la irakaj sunaistoj, kiujn ĝi plufoje helpis. Ĝi akuzas la eksan registaron de s-ro Nouri Al-Maliki esti, per sia kontraŭ-sunaisma politiko, la unua respondeculo de la sukceso de la OIŜ. Fine, la malfido al Irano restas enradikita kaj la gazetaro financita de la reĝlando pretendas, kontraŭ la logiko, ke la OIŜ povus rifuĝi en Irano. Timema realproksimiĝo ja aperas inter Tehrano kaj Riado, sed solida alianco restas malverŝajna.

Oficiale, Irano ne aliĝis al la koalicio. Ĝia rifuzo de la Parizo-Konferenco de la 5-a de septembro – paralela al la veto, kiun

Riado metis kontraŭ ĝia inkluzivo – malfortigas la kontraŭ-OIŜ-fronton. Kiel rekonis la 75-jara Gvidanto de la revolucio Ali Ĥamenei, el la hospitalo, kie li ĵus estis operaciita, kelkaj iranaj gvidantoj volis iri al Parizo, sed li kontraŭstaris : « *La intencoj de la usonanoj estas malbonaj, iliaj manoj plenas je iraka sango kaj ni ne povas kunlabori kun ili.* » Kaj Irano restas suspektema, same kiel Rusujo, fronte al la bombadoj al OIŜ en Sirio, timante provojn malstabiligi la Damasko-reĝimon.


Tehrano kaj Vaŝingtono gvidas kompleksajn intertraktadojn koncerne atomarmilojn, kiuj devas finiĝi antaŭ la 24-a de novembro.

Interkonsento ebligus al la du ĉefurboj aliri per nova rigardo la regionajn dosierojn (Sirio, Jemeno, Libano), sed estas malverŝajne, ke la islama Respubliko permesos al usonanoj regajni influon en

Irako, je ĝia malavantaĝo.

Usono ne povas trovi iun ajn konsolon en la iraka politika pejzaĝo. La ŝijajismaj milicoj, tre ligitaj al Tehrano, publikigis komunan komunikon avertante kontraŭ la sendo de usonaj soldatoj surloken. La plej grava, Asaïb Ahl Al-Haq (« Ligo de la justuloj »), kreita de la eksa ĉefministro Al-Maliki, tenas sub sia kontrolo la novan registarestro, s-ro Haïdar Al-Abadi : ĝi sukcese rifuzis la nomumon de ambaŭ ministroj pri defendo kaj pri internaj aferoj, kiuj devintus simboli la « malfermiĝon » de la nova povo. Fama pro siaj atakoj kontraŭ la sunaistoj, publike mallaŭdataj kiel « spionoj », ĉu ĝi estos la plej dinamika elemento de la milito kontraŭ la OIŜ ?

Rekonkero nepre postulas la kreadon de registaro de nacia unio en Bagdado. Kvankam s-ro Al-Abadi, la nova



ĉefministro, faris kelkajn paŝojn tiudirekten, adoptis pli kolektivian stilon, ordonis ĉesi la bombadojn de la civilaj zonoj sub la rego de la OIŜ, li ŝajnas nekapabla impulsi alproksimiĝon inter ĉiuj politikaj fortoj : la ŝijajmaj milicoj disponas pri tro granda pezo kompare kun la armeo ; la sunaistoj estas traŭmitaj pro la sperto de 2006-2007, kiam ili, partopreninte la batalon kontraŭ Al-Kaido, estis poste marĝenigitaj kaj subpremataj. Kaj la kurdaj gvidantoj revas nur pri sendependa ŝtato. De la konstitucio trudita de Usono en 2005, en Irako estas religia sistemo, kiu memorigas tiun de Libano. Ĝi igas praktike neebla la kreadon de nereligiaj partioj. Sen vera politika reformo, Irako estas kondamnita je divido kaj ĥaoso.

Se la irakanoj, eĉ kun la usona aviadila apogo, montriĝas nekapablaj - kiel estas antaŭvideble - retroirigi la OIŜ, kio estos la venonta etapo ? Antaŭ la senata komisiono pri militaj aferoj, la 15-an de septembro, la generalo Martin E. Dempsey, stabestro de la armeoj, ne ekskluzivis la sendon de usonaj trupoj se la nuna strategio ne funkcios. Pli krude, la generalo Michael Hayden, eksa direktoro de la *Central Intelligence Agency (CIA)* kaj de la *National Security Agency (NSA)* klarigis la antaŭan tagon sur la *Fox News*-televid-ĉeno : « *Mi opinias, ke ni havos specialajn fortojn en Irako kaj en Sirio. Mi ne opinias, ke ni havos tie regulajn trupojn, kvankam du eksaj ĉefoj de la Centcom (Centra Komandejo, ŝarĝita pri la tuta mez-orienta regiono) opinias, ke ni direktas nin al tio. Mi jam ne samopinias.* »

La siria kap-rompaĵo

INFLUA usona fakulo pri armeaj aferoj, Anthony H. Cordesman, de la *Center for Strategic and International Studies (CSIS)*, (Vaŝingtono), kvankam malfavoranta la sendadon de usonaj trupoj, rimarkas :

« *Irako (...) konservas batalantajn trupojn, sed bezonos specialajn fortojn, trupojn kiel la Rangers kaj aliajn fakulojn por kunordigi, trejni, starigi ligojn inter la surfacaj fortoj kaj aer-fortoj. (...) Nia tuta sperto en Vjetnamujo, en Afganujo, niaj unuaj monatoj en Irako, la provoj krei efikajn ribelulojn en Sirio kaj la neintensaj bataloj en Jemeno, konfirmas decidan lecionon de la milita historio : la trupoj de lando malforta kaj dividita bezonas helpon por esti kapablaj evoluigi sian koherecon, efikan aŭtoritaton kaj batal-kompetentojn. »*

Nu, se elradikigi la OIŜ en Irako ŝajnas ekster kapablo, kion diri pri Sirio ? Vaŝingtono, same kiel Parizo, rifuzas rerajtigon de la regpovo de s-ro Al-Asad. Tre malmultaj observantoj kredas, ke la 500 milionoj da dolaroj voĉdonitaj de la Kongreso por subteni la sirian moderan opozicion rapide ŝanĝos la surlokajn fortorilatojn. Do, kiu kondukos la surfacan ofensivon kontraŭ la OIŜ ? La bombado de celoj en Sirio, komencita la 22-an de septembro, ne estos pli efika ol en Irako, kaj povus montriĝi politike kosta : Tehrano kaj Moskvo kontraŭstaras ĝin, kaj Parizo, unu el la malmultaj ĉefurboj milite engaĝitaj flanke de Usono, rifuzas ĝis nun etendi sian agadkampon al Sirio, kiam neniu UN-rezolucio permesas tion pravigi.

La historio povas oferti kelkajn instruojn. En 1955, Vaŝingtono sendis en Vjetnamujon unu simplan armean mision, taskitan reorganizi la armeon. En 1959, tiu nombro fariĝis dekkvin. En 1965, oni nombris pli ol cent mil soldatojn (vd « *La voĉo de Francujo enterigita sub bombojn* ») La vjetnama milito daŭris ĝis 1975, kiam Usono fine akceptis ke, malgraŭ sendado de fortegaj armeaj trupoj, restas ĉiam malfacile decidi, anstataŭ la popolo, kio estas bona por ĝi.

Alain Gresh (1a Okt. 2014)

Libera programaro por socialreto : Diaspora*Framasphère

Ĉu vi ŝatas *Facebook* ? Vi ŝategos *Framasphère*, ankaŭ **uzebla en Esperanto** !
Framasphère estas senpaga. Sed plie, estas aŭtonama, malcentralizata kaj vi ne estas la produkto !

Ĉu vi iam memoras almenaŭ unu tagon de interreta normala uzado sen *Google*, nek *YouTube*, nek *Doodle*, nek *Skype* aŭ *Facebook* ? Eĉ se vi ne uzis tiujn ilojn, eble vi retumis sur paĝon enhavante reklamon de *AdSense* (reklamila firmao de *Google*) ? Afiŝante butonon «Ŝati» de *Facebook* ? Reprenante furor-*tweet-on* ? Ĉu vi certas ke vi malaktivigis geolokigilon de via *I-Phone* ? Ni fariĝis produktoj por tiaj firmaoj, kiuj, kolektante ĉiam pli kaj pli da informoj pri ni, monigas niajn profilojn kaj nian privatan vivon.

Ne estas la reto kiun ni volas. Ne estas tia socio, kiun ni esperas.



framaspHERE*

Se vi interesiĝas aliĝi la nova komunumo: Bonvenon ! Estas facile. Sufiĉas krei konton ĉe <https://framaspHERE.org>. Por la *facebook*-a ĝisostuloj, eblas eĉ ligi vian *facebook*-konton kun via profilo ĉe *Framasphère*.



La ŝoseo estas longa, sed la vojo estas libera !



Ni estus frenezuloj por forlasi povon al ĉiuj kiuj volas ĝin...



Eduardo Galeano, «Voĉoj de la Tempo»: La malliberejo

En 1984, Luis Niño inspektis la malliberejon de *Lurigancho* en Limo nome de organismo de defendo de la homrajtoj.

Li enprofundiĝis en tiuj amasigitaj solecoj kaj provis, laŭ la eblecoj, trati al si vojon inter la malliberuloj nudaj aŭ vestitaj per ĉifonoj.

Poste li petis paroli kun la direktoro de la malliberejo. Ĉar tiu forestis, akceptis lin la ĉefo de la sanservoj.

Luis klarigis, ke li vidis malliberulojn mortantajn, vomi sangon, ke multaj el ili ardis je febro kaj estis ronĝitaj de vundoj, sed ke li miris vidante eĉ ne unu kuraciston. La ĉefo klarigis al li :

- Ni, la kuracistoj, intervenas nur kiam la flegistoj vokas nin.
- Kaj kie estas la flegistoj ?
- Ni ne havas buĝeton por dungi ilin.



Bildstrio pri denaskuloj aperis en la angla

La usona bildstria desegnisto Dan Mazur publikigis 12-paĝan dokumentan komikson pri denaskaj parolantoj de Esperanto. La bildstrio aperis kiel parto de komiksa antologio pri la temo "subkulturoj". Libera Folio intervjuis la aŭtoron.

Libera Folio: Kiel vi ekhavis la ideon, kaj kiu estis via celo?

Dan Mazur: – Pli frue ĉi-jare mi eklaboris pri publikigo de antologio kun mallongaj originalaj bildstrioj de diversaj desegnistoj kun la temo "subkulturoj". Pensante pri diversaj subkulturoj mi ekhavis la ideon pri parolantoj de Esperanto kiel temo. Mi ne sciis multon pri Esperanto, kvankam mi konas ĝian ekziston ekde mia infanaĝo. Mi havis la svagan impreson, ke ĝi devenas de la komenco de la 20-a jarcento, kaj ian ligan en mia menso (probable eraran) rilate al utopiaj aŭ idealismaj movadoj, kiel Fabianismo. Mi pensis, ke temas pri sufiĉe multfaceta subkulturo, ĉar ĝi estas tiom aĝa.

– Mia unua gugla serĉo pri la temo trafis artikolon pri denaskaj parolantoj de Esperanto, kaj tio surprizis kaj fascinis min... denaskaj parolantoj ŝajnis kvazaŭ subkulturo ene de la subkulturo! Tiam mi decidis, ke mi volas verki kaj desegni ĉi tiun rakonton mem. Poste mi spektis en YouTube «intervjuon de Lana Shlafer», faritan en 2000, kaj eksciis pli.

Kiel vi kolektis la materialon?

– Kvankam mi estas bildstriisto, mi pli frue laboris ankaŭ kiel ĵurnalisto. Do, mi volis intervui iun por la rakonto. La sola loka kontakto, kiun mi povis trovi, estis la Esperanto-klubo ĉe Massachusetts Institute of Technology. La klubo montriĝis neaktiva, sed mi ricevis respondon de iama

membro, Erin Piateski. Ŝi helpis al mi pri kelkaj kontaktoj, kaj baldaŭ mi ekrilatis kun kvin esperantistoj, eŭropanoj kaj usonanoj, kvar el kvin estis denaskaj parolantoj, do estis bona miksaĵo. Mi faris intervjuojn per reto, krom kun Julie Schwartz, kiu loĝas proksime, kaj kiun mi povis renkonti. Por Lana Shlafer, mi uzis citaĵojn el ŝia intervjuo en YouTube.

– Kun tiom da voĉoj, mi decidis strukturi la rakonton kiel dokumentan bildstrion, kunteksante la intervjuojn per iom da historio. Mi trovis, ke estis multo komuna precipe inter la denaskaj parolantoj, sed estis interese ke aperis ankaŭ iom malsamaj sintenoj al la Esperanta kulturo.

– Kiam la teksto estis verkita, mi sendis ĝin al ĉiuj priskribatoj por ricevi ilian aprobon, kaj poste mi desegnis la bildstrion. Mi multe komunikadis kun la priskribatoj por certiĝi, ke mi ne faras erarojn en la Esperanto, kiun mi uzas en la bildstrio. Kiel vi probable komprenis, mi mem ne parolas aŭ legas Esperanton. Sed la laboro kun la rakonto igis min ekinteresiĝi lerni ĝin... Esperantistoj ŝajnas bone amuziĝi!

Kie aperis via bildstrio? Kiajn reagojn vi ricevis?

– La libro kun la titolo *SubCultures: a Comics Anthology* estis publikigita en septembro, kaj enhavas la 12-paĝan rakonton *Esperantists*. Rilate al reagoj, mi trovis ke homoj tre interesiĝas pri la temo – multaj kun kiuj mi parolas preskaŭ ne aŭ tute ne scias, kio Esperanto estas. Mi ankaŭ eksentas iom da interesiĝo inter esperantistoj, kiel vi! – La libro mem estas havebla en mia eldonejan retejo (<http://ninthartpress.blogspot.be/2014/07/subcultures-anthology.html>).

libera folio


ESPERANTISTS

BY DAN MAZUR 5/14



STELA
AGE 26

I LEARNED ESPERANTO FROM MY MUM, AND HUNGARIAN, SIMULTANEOUSLY FROM MY GRANDAD AND SISTER, BUT CLEARLY ESPERANTO WAS EASIER, OR STUCK FIRST, BECAUSE...



...MY FIRST WORD:

VIDU!

* "LOOK!"

IN MY CHILDHOOD, ESPERANTO WAS A NATURAL INGREDIENT OF MY LIFE. I DIDN'T REALIZE THAT LEARNING THREE LANGUAGES AT ONCE WAS ANYTHING SPECIAL.

WILLST DU MIT MIR SPIELEN?¹

ĈU MI RAJTAS LUDI KUN ILI, PAĈJO?³

SKAL VI LEJE SAMMEN?²



PETER
AGE 67


1. GERMAN: WANT TO PLAY WITH ME? 2. DANISH: SHOULD WE PLAY TOGETHER? 3. ESPERANTO: CAN I PLAY WITH THEM, DAD?

IT'S HARD FOR PEOPLE WHO'VE NEVER HEARD OF IT TO GRASP THE CONCEPT - THEY ASSOCIATE A LANGUAGE WITH A PLACE:

"WELL, WHERE DO THEY SPEAK IT? WHERE'S ESPERANTO-LAND?"



LANA
AGE 33



IT'S A RARE THING - A SUCCESSFUL ARTIFICIAL LANGUAGE. AND AS A MEANS OF COMMUNICATION IT IS VERY SUCCESSFUL..



JOHANO
AGE 34



...THE WAY BETAMAX WAS SUCCESSFUL!

1a Verda Promenado :

La Reĝaj Parkoj

Fotoj de Birdino kaj Nikolao



La 12an de Oktobro, je kvazaŭ somera dimanĉo ni promenadis en la reĝaj parkoj kiuj troviĝas inter la Placo Sankta-Lamberto kaj la ĉina paviljono. Ni vizitis la Kolonia Ĝardeno, la Parko Sobieski, la mirinda Parko de la Floristoj. Poste ni iris en la Parkon de Laeken kaj la ĝardenon de la Ĉina Paviljono. Ni danku Mišel Laitat kiu estas preparanta tutan serion da tiaj promenadoj. **Do, ne maltrafu la sekvontajn.** Sur la reta versio de AKTUALA vi povas musklaki [tiun ligilon por malfermi ampleksan galerion](#) de fotoj de Nikolao kaj Birdino



Nikolao